



27a jarkolekto - majo 2006/5

# **Monato**

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X



## **La malgranda Budho**



## **Tri personaj impresoj pri Togolando**

# **Vizito al Novarto- urbo Nancy**

# Stefan Maul

## El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

# Pri fornoj kaj formoj 8 pasioj kaj pastaĵoj mono kaj kono...

Nia togolanda korespondanto Gbeglo Koffi prezentas tri personajn impresojn pri sia lando.



# 14 Vizito al Novarto- urbo Nancy




Pro Novarto famiĝis la grandurboj Parizo, Bruselo, Barcelono kaj Prago. Tamen la stilo influis ankaŭ malpli gravajn kaj internacie malpli konatajn urbojn kiel ekzemple Rigon, la ĉefurbon de Latvio, kaj Nancy, urbon en nord-orienta Francio.

# Katalunoj 17 sed ne katoj

La 13an de februaro ekfunkciis la interreta finaĵo .cat por la „kataluna lingva kaj kultura komunumo”. Unuafoje kultura komunumo, principe ne ligita kun difinita teritorio, ricevas tian agnoskon de ICANN.



# 21 La malgranda Budho



Meze de marto la gazetaro anoncis la malaperon de Ram Bahadur Bamjan, alinomata „la malgranda Budho”. La jenan artikolon skribis nepala kunlaboranto de MONATO kelkajn tagojn antaŭ la malapero de la knabo.

<b>MODERNA VIVO</b>	
<b>Togolando</b> .....	8
Pri fornoj kaj formoj, pasioj kaj pastaĵoj, mono kaj kono...	
<b>Bona Betono</b> .....	10
<b>Litovio</b> .....	10
Efike studi	
<b>Medicino</b> .....	10
Fremdaj korpoj	
<b>Tradicioj</b> .....	11
Priploru la krizan temon	
<b>Japanio</b> .....	11
Malmoda modelo	
<b>ESEO</b>	
<b>Ekonomiko</b> .....	13
„Malgranda estas bela”	
<b>TURISMO</b>	
<b>Vizito al Novarto-Urbo Nancy</b> .....	14
<b>KOMPUTADO</b>	
<b>Interreto</b> .....	17
Katalunoj sed ne katoj	
<b>SCIENCO</b>	
<b>Eltrovo de prionoj</b> .....	18
Nova etapo en biologio kaj medicino	
<b>SPIRITA VIVO</b>	
<b>Nepalo</b> .....	21
La malgranda Budho	
<b>Madagaskaro</b> .....	22
Ŝtatlaikeco minacata	
<b>MEDIO</b>	
<b>Aŭstrio</b> .....	23
Ekspertoj pri klimatsanĝiĝo	
<b>ARTO</b>	
<b>Viddiskoj</b> .....	24
Originala DVD-filmo tre spektinda	
<b>Albanio</b> .....	24
Ibrahim Kodra, la lasta kubisto	
<b>LIBROJ</b>	
<b>Bonstile verkita streĉa romano</b> .....	25
<hr/>	
<b>Abonoj</b> .....	4
<b>Enkonduko</b> .....	5
<b>Leteroj</b> .....	6
<b>El mia vidpunkto</b> .....	7
<b>Anoncetoj</b> .....	27



# Kiel pagi vian abonon de MONATO?

## ► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank, 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be) (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko traktata je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

## ► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	25	5	10
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	50	5	9
Brazilo	EUR	23	25	5	10
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	25	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	25	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	42	5	10
Hungario	EUR	23	25	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	42	5	10
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6600	6900	860	1220
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	42	5	10
Kroatio	EUR	23	25	5	9
Latvio	EUR	23	25	5	9
Litovio	EUR	23	25	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	370	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugalia	EUR	36	41	5	9
Rusio	EUR	23	25	5	9
Singapuro	EUR	41	42	5	10
Slovakio	EUR	23	25	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	42	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	71	82	9	14
Tajvano	EUR	41	42	5	10
Usono	USD	61	63	8	13
Bazo eŭropa	EUR	46	50	5	9
Bazo ekster-eŭropa	EUR	48	50	5	10

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiiilo +32 32 33 54 33.

## ► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: [esperfed@ans.com.au](mailto:esperfed@ans.com.au).
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: [leopold.patek@esperanto.at](mailto:leopold.patek@esperanto.at).
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: [financo@fel.esperanto.be](mailto:financo@fel.esperanto.be).
- **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: [bel@esperanto.org.br](mailto:bel@esperanto.org.br).
- **Brita:** David Kelso, 5 Craighenhill Road, Kilncadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: [davidekelso@yahoo.co.uk](mailto:davidekelso@yahoo.co.uk)
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variabi. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: [cea.polnický@quick.cz](mailto:cea.polnický@quick.cz).
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: [arne-casper@email.dk](mailto:arne-casper@email.dk).
- **Estono:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: [virveernits@hotmail.ee](mailto:virveernits@hotmail.ee).
- **Finnio:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: [eafofficejo@esperanto.fi](mailto:eafofficejo@esperanto.fi)
- **Francio:** Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: [esperanto-france@esperanto.org](mailto:esperanto-france@esperanto.org).
- **Germanaj:** Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: [s.h.maul@t-online.de](mailto:s.h.maul@t-online.de).
- **Literatura-Servo "Espero",** Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schweringen (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
- **Hans Dieter Platz,** Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: [HDP@internacia-festivalo.de](mailto:HDP@internacia-festivalo.de).
- **Wolfgang Schwanzer,** Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: [wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de](mailto:wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de)
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: [kea-kasisto@esperanto.cat](mailto:kea-kasisto@esperanto.cat).
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: [abonasoft@gmail.com](mailto:abonasoft@gmail.com).
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: [noviresp@eircom.net](mailto:noviresp@eircom.net).
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: [esperant@ismennt.is](mailto:esperant@ismennt.is).
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: [f.esp.it@infinito.it](mailto:f.esp.it@infinito.it).
- **Japanaj:** KLEGG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. Reto: [kleg@mvf.biglobe.ne.jp](mailto:kleg@mvf.biglobe.ne.jp).
- **Japano Esperanto-Instituto,** Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. [esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp).
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: [iwoleskatl@shaw.ca](mailto:iwoleskatl@shaw.ca).
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: [kea-kasisto@esperanto.cat](mailto:kea-kasisto@esperanto.cat).
- **Koreo:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: [esperant@unitel.co.kr](mailto:esperant@unitel.co.kr)
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: [miauguau@racsa.co.cr](mailto:miauguau@racsa.co.cr)
- **Kroato:** Kroato Esperantista Unuigo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. Reto: [mbeLOSEV@public.srce.hr](mailto:mbeLOSEV@public.srce.hr).
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: [Margarita@rsu.lv](mailto:Margarita@rsu.lv).
- **Litova:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: [stralaim@takas.lt](mailto:stralaim@takas.lt).
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: [esper\\_lu@geocities.com](mailto:esper_lu@geocities.com).
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net).
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: [inform@esperanto.no](mailto:inform@esperanto.no).
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004. Reto: [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz).
- **Pola:** Skribu al la eldonejo kaj pagu al Danuta Leyk, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328@PKO BP XIV O/Wwa.
- **Ruslandaj:** Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: [sezonoj@gazinter.net](mailto:sezonoj@gazinter.net).
- **Mikaelo Ĉertilov,** Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: [mikaelo@km.ru](mailto:mikaelo@km.ru).
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: [cbeckford@telkomsa.net](mailto:cbeckford@telkomsa.net).
- **Svedaj:** Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: [persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com](mailto:persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com).
- **Sveda Esperanto-Federacio,** c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, S-242 94 Hörby. Reto: [bertil.andreasson@horby.mail.telia.com](mailto:bertil.andreasson@horby.mail.telia.com).
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: [ch\\_scheidegger@bluewin.ch](mailto:ch_scheidegger@bluewin.ch).
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: [elna@esperanto-usa.org](mailto:elna@esperanto-usa.org)
- **Venezuela:** Peter Jaimez, Apartado 3482, Caracas 1010A. Reto: [peterjaimez@tutopia.com](mailto:peterjaimez@tutopia.com).



# Skribu leterojn!

Kompare al ordinara skribado de leteroj helpe de la klasika poŝto, sendi leterojn per reto estas multe pli simple. Por sendi ekzemple paperan leteron el Germanio al Brazilo necesas multaj paŝoj (ankaŭ laŭvorte!): Vi devas skribi per mano aŭ maŝino, prepari koverton kun adresoj de sendanto kaj adresato per klare legeblaj literoj, aĉeti poŝtmarkojn, afranki la leteron (ĝuste laŭ la tarifo), porti ĝin al poŝtkesto kaj esperi, ke post kelka tempo ĝi alvenos nedifektita. En la kazo de Brazilo el Germanio tio estas minimume unu semajno, sed leteroj senditaj el la eldonejo en decembro atingis ĉiujn brazilajn adresatojn nur en marto ...). Por la sama proceduro en kazo de retletero nur la tajpado de la teksto estas same tempobezona; por sendi ĝin sufiĉas kelkaj musklakoj – kaj jen, post kelkaj sekundoj aŭ maksimume minutoj la adresato ricevas ĝin kie ajn en la mondo. La adresato laŭplaĉe povas legi sur ekrano aŭ elpresi, tiel ke el elektronika fariĝas normala paper-letero. Kiom komforte kompare al ordinara leter-sendado!

Pli kaj pli multaj homoj uzas tiun ĉi simplan metodon por sendi leterojn. Ankaŭ nia multjara leter-redaktoro Aimo Rantanen spertis tion post sia eklaboro en 2001: pli kaj pli ofte leteroj ne venis laŭ la ordinara vojo sed al nia koncerna ret-adreso *monato-leteroj@fel.esperanto.be*. Nun pro sankialoj li devis demisii; ni dankas lin pro la fidela plenumado de tiu ĉi tasko, kiu ne ĉiam estas facila kaj bezonas sufiĉe da sentemo, ekzemple por la limo inter kritiko kaj kolumnio kaj ofendo, al kiuj inklinas fojfoje skribantoj de leteroj. Lian taskon, cetere, transprenis nia redakcia sekretario Paul Peeraerts. Por vi kiel eventuala skribanto de leteroj al nia revuo la adresoj restas samaj; vi trovas ilin en la apuda kolofono sub la rubriko „Leteroj”. Ne hezitu skribi al ni, ĉu „helikpoŝte”, ĉu retpoŝte. Aŭtoroj kaj redaktoroj estas eraremaj homoj, do korektu iliajn erarojn kaj kritiku, se io ne plaĉas al vi. (Kompreneble vi rajtas ankaŭ laŭdi ...) Se vi ne havas retpoŝton, certe por vi peno kaj kosto estas iom pli grandaj, sed tio ja ne detenu vin. Por nia revuo gravas la dialogo kun vi, niaj legantoj. Ni ĝojas pri ĉiu letero. Skribu do!

Sincere via

Stefan MAUL

**MONATO**, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 27a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵito ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, menuu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

*Verantw. uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

### eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33; retpoŝto: monato@fel.esperanto.be, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

### ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.  
Rete: s.h.maul@t-online.de

### reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts,  
Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

### redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.

### grafiko:

Ferriol Macip i Bonet.

### redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Reto: moonmont@pt.lu.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Reto: rotsaert@esperanto.be.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 59, B-4700 Eupen, Belgio. Reto: jp@fel.esperanto.be.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: Evgeni.Georgiev@gmx.at.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: edmund820@rano.org.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: monato-leteroj@fel.esperanto.be.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: b\_kolker@yahoo.com. **Nota:** Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro propraincicie. La kunlaborantoj ricevas la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: syama@qf6.so-net.ne.jp.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: mgglez@enet.cu.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: paulgubbins@tiscali.co.uk.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 306, 82840-420 Curitiba, PR Brazilo. Rete: gmattos@brturbo.com.br.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: paulgubbins@tiscali.co.uk.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: teccardt@hotmail.com
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: gerrit.en.madzy@planet.nl.
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: grigorij@lenta.ru.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: s.h.maul@t-online.de.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: Evgeni.Georgiev@gmx.at.

## Ĉu Katalunio estas sendependa?

Vi publikigis ĉefartikolon pri Katalunio „Survoje al pli granda memregado” (MONATO 2006/2, p. 10), sed ŝajnas, ke MONATO jam traktas Katalunion kiel sendependan ŝtaton. En MONATO 2006/1, p. 6, vi aperigis kvin leterojn, inter ili unu el Hispanio kaj unu el Katalunio! Nu, ĉu Katalunio ne estas parto de Hispanio? Laŭ la artikolo „Survoje...”, kaj laŭ mia scio, ŝajnas, ke Katalunio ankoraŭ restas regiono de Hispanio.

En tiu sama numero estis ankaŭ letero el Italio, sed kial anstataŭ „Italio” vi ne metis la region-nomon (ekzemple Toskanio)? Kaj mi rimarkis en MONATO 2005/4, p. 6, leteron el Eŭskio. Ĉu MONATO jam sendependigis la eŭskan regionon de Hispanio? Sekvontpaĝe troviĝas letero el Usono, sed mi demandu: kial anstataŭe vi ne indikis la specifan usonan ŝtaton? Vi traktas landojn malsame, malkonsekvence; vi ŝajne enŝovas vian politikan sintenon pri iuj regionoj kiuj, vi kredas, devus esti sendependaj.

Nyegosh DUBE  
Pollando

*Jam de pli ol 25 jaroj ekzistas la regulo, ke aŭtoro de letero mem decidus, al kiu nacio li apartenas. Se aŭtoro diras, ke li loĝas en Ĥinrio, Eŭskio aŭ Frislando, MONATO ne ŝanĝas tiun indikon al respektive Britio, Hispanio aŭ Nederlando.*

## Signalo

Christian Pinard konkludas en sia artikolo *Signalo – ankoraŭ ne revolucio* (MONATO 2006/1, p. 9-10), ke la francaj ribeloj estas antaŭsignalo por eventuala posta revolucio. Sed li vidas nur unu faktoron, kiu kulpas pri tio: la novliberalisman kapitalismon, kiu kaŭzis la diferencojn inter riĉaj kaj malriĉaj tavoloj. Tio sendube estas unu faktoro, sed laŭ mi ne la ĉefa.

La ribelon efektivigis nur gejunuloj, francaj civitanoj kun neblankula rasa deveno (araboj, aliaj afrikanoj ...), sen partopreno de blankulaj francaj malriĉuloj. Laŭ mi la ĉefa kaŭzo estas maljusta sistemo, kiu konstituas la tutfranca identeco baze de blanka raso. Novaj generacioj, kies prauloj estas alirasaj, sentas sin francoj, ĉar Francio estas ilia sola patrujo, sed ili koleras pro tio, ke la socio ĉirkaŭ ili traktas ilin kiel duarangajn personojn. Tiu raskaŭzita

duarangeco, ligita kun malriĉeco, estas ege forta eksplodaĵo. Se Francio (kaj pli vaste la tuta Eŭropa Unio) ne komprenos tion kaj ne rapide entreprenos ion por reale solvi la problemon, la nuna spontanea ribelo iom post iom fariĝos organizita ribelo. Ĉar plej multaj francoj neblankasaj estas islamanoj, ilia organiziĝo okazos sub la egido de islamreligia ideologio. El efektiva rasa malegaleco fariĝos religia konflikto kaj tre danĝera duonmilita stato. Pri klasika revolucio oni ne povas paroli, ĉar en ĝi devus esti interesita la tuta popolo (do ankaŭ blankulaj francoj). Alirasaj francoj montris sian malkontenton per la aŭtobruŝita ribelo, mesaĝante, ke ili ne volas esti duarangaj francoj. Se la franca ŝtato ignoras tiun mesaĝon kaj reagos estonte nur perforte, sekvos terorismaj agoj. Ju pli multe la ŝtatorganoj uzos la forton, des pli kreskos la ribelo. La rezulto estos ŝtato kun ĉiam malpli da individua libereco kaj ĉiam malpli da demokratio.

Zlatko TIŠLJAR  
Slovenio

## Batoj sub la zono

Min tre konsternis la batoj sub la zono de Gerrit Berveling kontraŭ la kandidatigo por la Nobelpremio pri paco de la konservativa (?) parlamentanino Ayaan Hirsi Ali (MONATO 2006/3, p. 11). Mankas konvinkaj argumentoj, abundas vortoj kaj esprimoj nutritaj de negativaj emocioj.

Ne gravas scii, ĉu oni povas cirkumcidi virinon aŭ ne, gravas la pacema batalo de viktimo kontraŭ tiu grava mutilo. Krome, en intervjuo ŝi akcentis, ke temas pri origine afrika kaj do ne islama kutimo. Tamen ŝi firme batalas kontraŭ la subpremado de la virino en diversaj islamaj kulturoj. Ŝi kaj Theo van Gogh surbaze de esprimlibero klarigis sian opinion pri certaj aspektoj de islamismo. Se vi aŭ mi ne plu rajtas esprimlibere klarigi propran opinion, ni tuj forĵetu la akiraĵojn de la klerismo kaj de la demokratio. Krome ĉiu, kiu opinias, ke oni insultis aŭ provokis lin, rajtas plendi en (internacia) tribunalo.

La nederlandaj gazetaro kaj televido malkovras klare, kion vere malŝatas multaj nederlandanoj pri Hirsi Ali. Unue, ŝi kaj Theo malkaŝe diras, kion iliaj samlandanoj pensas, sed pro historiaj kialoj (la tiel nomata senlima nederlanda toleremo) ne kuraĝas laŭte esprimi. La plej grava kialo

tamen estas, ke Ayaan iĝis „religia mal-fidelulino”. Multon anoj de religio povas pardoni, sed ateismon ... Imagu, ateisto, kiun oni kandidatigas por la Nobelpremio pri paco. Sufiĉas rigardi nomojn kiel Henry Kissinger, Yasser Arafat, Wangari Maathai aŭ Lech Wałęsa por konstati, ke Berveling eble pravus. Anstataŭ Hirsi Ali oni kandidatigu la „pian” Condoleezza Rice. Oni laŭdas ŝiajn insultojn kaj provokojn kontraŭ la Internacia Rajtaro, aplaudas por la bombardadoj kontraŭ senkulpaj civitanoj de islamaj landoj kaj pardonas la turmentojn kontraŭ „teroristoj” en koncentrejoj, kiel tiuj en Guantanamo, Abu Ghraib, ktp, ktp.

Aldone kelkaj saĝaj vortoj de Salman Rushdie: „En la nomo de dio, iomete ni malfermu la kosmon!”

Bert BOON  
Belgio

## Bato sub la zono (2)

Konsternis min en MONATO 2006/3, p. 11, la artikolo „Malpaciga pacpremio”. La „krimo” de Ajaan Hirsi Ali, kiun oni kandidatigis por la Nobelpremio pri paco, estas laŭ Gerrit Berveling ŝia batalado kontraŭ islamismo, precipe pro vagina mutilo de junaj knabinoj. Eĉ se islamano ne kulpas pri la ekzisto de tiu hontinda kutimo (per egiptaj mumioj estas rivelite, ke oni praktikis tiun operacion longatempe antaŭ la naskiĝo de Mahometo), kial ĝi ne luktis kaj ne luktas por forigi tiun malhumanan kutimon? Ĉu Berveling scias nenion pri la realaĵoj de la mondo? Mi konsilas al li la legadon de la verko de Suad Vivbruligita (*honorkrimo*), eldonita de SAT.

Monik ROBERT-BERNARD  
Francio

## Bato sub la zono (3)

Ne povas mi ne reagi al parto de la artikolo de Gerrit Berveling. Li skribis: „grava mutilo de la vagino, parta fortranĉo de la vaginaj lipoj”. Mi ĝustigas: Temas pri kutimo de iuj popoloj pri rita fortranĉo de la klitorio kaj kelkfoje ankaŭ de la etaj lipoj, por forpreni de la estonta virino la seksan ĝuadon kaj konservi ŝin fidela al la edzo. Por mi, virino, tio estas grava suferiga mutilado. Mi nur povas gratuli al sinjorino Hirsi Ali, kiu atakas tiun misagadon.

Denise HUBERT-REMY  
Francio

# Satiro kaj realo

de Stefan MAUL

*Fojfoje estas tre malfacile, ne skribi satiron. Por eviti ĝin, ni kreas fikcion:*

**A**lbert Bauer fuĝas el la fundamentisma kristana Germanio al Afganio. Tie li ricevas ŝtatan civitanecon kaj konvertiĝas al islamo. 16 jarojn poste li revenas al liberigita Germanio, kie intertempe oni forpelis la ekstrem-kristanan reĝimon kaj komencis instalati demokration; aliancaj islamaj trupoj – inter ili 3000 afganaj soldatoj – sekurigas la demokratian evoluon. Sed la familio de lia edzino akuzas lin pro perfido de kristanismo; supera juĝisto tuj deklaras publike, ke laŭ la kristana leĝaro eblas kondamni lin nur je morto. Tuj eksplodas amasaj protest-manifestacioj en la tuta islama mondo; ili postulas, ke Germanio obeu al la propra konstitucio, kiu garantias religian liberecon. Sed la papo en Romo deklaras, ke tio ne validas por eklezia juro, kiu postulas mortigon de perfiduloj.

## Mortpuno, nepre

Kaj nun la realo: La afgano Abdul Rahman antaŭ 16 jaroj venis al Eŭropo kaj konvertiĝis al kristanismo. Dum 9 jaroj li vivis en Germanio kaj akiris ties ŝtatanecan. Intertempe okcidentaj trupoj forpelas la fundamentisman islaman reĝimon en Kabulo kaj instalas demokration. Kun aliaj okcidentaj trupoj ankaŭ 3000 germanaj soldatoj provas garanti la evoluon al demokratio. Kiel germana civitano kaj kristano Rahman revenas en 2005 al sia hejmlando. Pro kvereloj pri liaj 2 filinoj en marto 2006 la familio akuzas lin pro perfido de islamo. La juĝisto tuj deklaras, ke pro la ŝario (islama leĝaro) ne eblas io alia ol kondamni lin je morto. La germana kaj aliaj okcidentaj registaroj protestas kaj postulas liberecon

por Rahman, atentigante, ke en Afganio la konstitucio garantias religian liberecon. Sed la teologoj-juĝistoj insistas, ke oni devas apliki la ŝarion. Ne okazas iuj protest-manifestacioj en kristanaj landoj, tamen la papo petas la afganan prezidanton por indulgo. Manifestacioj tamen okazas en Afganio; islamanoj protestas kontraŭ la eventuala liberigo de Rahman kaj krias „morton por kristanoj!”. Teologoj postulas mortigi lin; pro mortminacoj de kunarestitoj oni transigas lin al alia karceri. Fine oni deklaras, ke Rahman estas psike malsana kaj pro tio ne eblas procesi kontraŭ li, kaj oni transportas lin eksterlanden.

## Religia perfortemo

Ni scias, ke multaj religioj principe inklina al perforto aŭ estas eĉ militemaj (ĉar ja „nur ni posedas la veron”). Judoj helpe de romianoj mortigis herezulon Jesuo, romianoj persekutis kaj murdis kristanojn, kristanoj brulmortigis herezulojn, islamanoj militis en sud-orienta Eŭropo kontraŭ kristanoj, kristanoj dum krucmilitoj amase murdis islamanojn, kristanaj konfesioj inter si militis – plej fifama estas la tridekjara milito. Tamen, el la grandaj mondreligioj, judismo kaj kristanismo evoluis (ne gravas, pro kio) al pacamaj organizaĵoj, kvankam ankoraŭ fine de la pasinta jarcento kristanoj militis inter si, ekzemple en Nord-Irlando kaj eksa Jugoslavio. Sed ĝenerale kaj laŭ propraj doktrinoj kristanoj hodiaŭ obeas al Jesuo Kristo, kiu predikis pacon kaj postulis ami eĉ siajn malamikojn.

## Naiva espero

Judoj en Israelo vole-nevole militas kontraŭ palestinanoj, kiuj parte volas ekstermi la judan ŝtaton; ambaŭ flankoj aplikas teror-metodojn. Sed ankaŭ en jud-



Abdul Rahman

ismo, kiel en kristanismo, hodiaŭ ĝenerale ne plu validas la rigoraj principoj kontraŭ alireligianoj. Kontraste al la aliaj, la islama socio ne nur ne evoluis en direkto al pli da liberaleco kaj humaneco, sed eĉ retropaŝis, fariĝis pli kaj pli agresema kaj militema. Sekve de la irana revolucio en tiu lando instaligis fundamentisma reĝimo, poste sekvis Afganio kun eĉ pli rigora fundamentismo. Ambaŭ reĝimoj subtenis kaj finance helpis islamistan terorismen, ĝis la kulmina detruo de komercaj turoj en Novjorko kun miloj da murditoj. Nuntempe precipe en Irako islamistoj militas ne nur kontraŭ „la okcidento” (t. e. kristanismo), sed ankaŭ la du grandaj konfesioj unu kontraŭ alia. (Cetere, la ŝario kun mortpuno por perfiduloj de islamo validas krom en Afganio ankaŭ en Irano, Saŭda Arabio, Sudano kaj Maŭretanio.)

Certe, estas troigo paroli pri „milito de la kulturoj”. Aliflanke estas iom naive, en tiaj situacioj kaj sub tiaj kondiĉoj kredi je vera dialogo inter la du kulturoj, islama kaj okcidenta. En multaj islamaj landoj fundamentismaj movadoj kreskis kaj kreskas, kiel ekzemple montras la venko de terorisma partio Hamas dum liberaj elektoj en Palestino. Ĉu plaĉas al ni aŭ ne, ni devas konstati, ke perfortemo kaj militemo en islamo havas fortajn radikojn en la religio mem. Ni ja povas esperi sed certe ne atendi, ke la modera kaj tole-remaj partoj en islamo baldaŭ sukcesas superi la perfortemon. ■



# Pri fornoj kaj formoj, pasioj kaj pastaĵoj, mono kaj kono...

Nia togolanda korespondanto Gbeglo Koffi prezentas tri personajn impresojn pri sia lando.



*Argilkotaj fornoj eligas multe da fumo, sed per ili eblas bone kuiri. La fostoj subtenas pajlan tegmenton por protekti kontraŭ la suno.*

## Fornoj kaj formoj

La tuta ĉambro plenas je fumo. El la nazoj kaj la okuloj de tiuj, kiuj enestas, elfluas likvaĵo. Mi eniras la ĉambro, klopodas elteni, sed la fumo tiom pikas, ke mi fuĝas eksteren. Grumbas mia vicpatrino: „Koffi, revenu, se ne, vi ne manĝos. Vi timas la fumon; vi devas timi ankaŭ la manĝon, kiun mi pretigas nun. Se ankaŭ mi timus la fumon, ĉu mi povus pretigi la manĝon por vi? Tuj revenu!”

La forno estas farita el argilkoto. Ĝi havas unu aperturon, en kiu oni metas lignon. La dua aperturo estas supre kaj subtenas la poton, en kiu oni kuiras. Ekzistas alia forno pli simpla, kiu tute ne donas fumon. Ĝi uzas karbon, kiun oni braĝigas por

kui la manĝaĵon.

Mia vicpatrino devus uzi tian. Sed ŝi sakras: „Mi neniam manĝos ion kuiritan sur braĝoj. Miaj gepatroj neniam kuiras sur braĝoj; ili scias, ke la manĝoj ne estas bone kuiritaj, kaj tiel estiĝas malsanoj. Nur en potoj argilaj mi kuiras, uzante lignajn spatelojn.”

Ne ĉiuj ŝatas tiujn ĉi fornojn. Dum la argila kaj la braĝa daŭre ekzistas en Togolando, multaj preferas gasaŭ elektro-fornojn. Ĉiu scias, ke la argila, kiu donas bonan fajron por kuiri, plenigas per fumo la ĉambro. Rezulte ili estas uzataj ĝenerale ekstere, sur la korto, aŭ en kuirejoj ne fermitaj. Sed kiam pluvas, prokrastiĝas kuirado.



## Pasioj kaj pastaĵoj

„Kio estas tio? Ĉu rizo? Ĉu tion vi pretigas al mi? Ne, mi tute ne povas manĝi semojn de papajo. Tio tute ne povas satigi min. Rapidu reen al la bazaro, ke tuj aperu pastaĵoj kun legomsaŭco en la domo.” Tiel grumbblas homoj en vilaĝoj subtogolandaj, al kiuj nepras pastaĵo.

Por prepari paston oni muelas maizon por havi farunon. Kuirpoto kun akvo staras sur forno. Antaŭ ol boligi la akvon, oni enmetas iom da faruno, nur malgrandan kvanton.

Kelkajn minutojn poste, kiam bolas la akvo, oni enmetas pli da. La kuiranto kirlas la tuton, ĝis pretiĝas la knedaĵo, la pasto. Ĝin oni metas en teleron, sed ankoraŭ mankas la saŭco.

Oni havas diversajn saŭcojn. Kelkaj estas simplaj supoj sen legomoj, kaj ili estas la ĉefa ingredienco en aliaj. La saŭcoj, kiuj bone akompanas la paston, estas gluecaj. Tiun ĉi karakteron donas apartaj legomoj lokaj kun la nomoj *gombo* aŭ *ademe*. Ankaŭ pistitaj baobabo-folioj povas

enesti, kaj ekzistas aliaj legomoj similaj al spinaco. Ankaŭ fiŝoj, kraboj, salkoj kaj viandoj enestas en la saŭcoj. Kelkaj preferas la saŭcon; aliaj voras kun pasio la pastaĵon.

Ne povas pasi senpastaĵa tago. Kelkaj homoj manĝas pastaĵon tri fojojn tage, kaj ofte la matena pastaĵo estas restaĵo de tiu de la antaŭa vespermanĝo. Ne estas fridujoj en la vilaĝoj, sed ĉirkaŭ la sesa horo, eĉ ne varmigte la pastaĵon, jen oni matenmanĝas.

## Mono kaj scio

„Kio? Ĉu Zara frenezas? Ne tiun li postkuras, kiu prenis la monujon, sed la alian, kiu prenis la kajeron.” Jes, tute ne komprenebla afero kaj ĉiu volas pli funde scii, kio okazis. Jen!

Zara estas trapasonta sian abituriantan ekzamenon. Preskaŭ ĉiutage li lernas siajn lecionojn, kaj pro tio havas lokon en lernejo por fari diversajn ekzercojn matematikajn. Manĝi por li fariĝas tute ne eble ĉar, laŭ li, nun sukcesis la ekzamenon pli gravas ol manĝi, kio povas okazi iam ajn, dum la ekzameno nur unufoje en la jaro. Li do tiom kroĉiĝas al siaj kajeroj, ke li eĉ aŭdas ilin paroli kun li. Zara kaj liaj kajeroj estas pli ol amikoj, kaj li tute ne povas eĉ unu minuton forlasi ilin.

Iam li lernas siajn lecionojn en klasĉambro. Tiu ĉi ne havas pordojn, kaj la muroj estas nur duone faritaj, tiel ke oni do povas tra ĉiu fendo eniri en ĝin. En tiu klasĉambro laboras Zara. Subite li eliras el la ĉambro. Li kuras al necesejo kaj, kiam li revenas, jen du homoj prenas liajn kajeron kaj monujon. Tuj li postkuras la preninton de la kajero. Li flugigas la piedojn kaj proksimiĝas al la ŝtelinto. Tiu ĉi forĵetas la kajeron. „Dankon,” diras Zara, kiu tute kontenta prenas la kajeron, ridante. Li eĉ ne volas scii pri la monujo.

Dum Zara tiom ligiĝas al siaj kajeroj, pluraj kamaradoj serĉas rimedojn por subaĉeti la ekzamenontojn. Kelkaj eĉ ĉesas lerni kaj eklaboras ĉe la haveno por gajni monon.

Zara ne konsentas. „Mono gravas,” li diras, „sed ekzistas io alia, kion ni ne facile komprenas. Temas pri scio de diversaj aferoj. Ni devas kulturi nin, kaj tio eblas nur per studado. Kiu havas scion, al tiu certe neniam mankas mono.”

Kiu havas scion, al tiu mono povas iri, sed de tiu, kiu havas monon, ofte la scio forfuĝas. Ofte la sci-havanto estas humila kaj facile komprenas aferojn, dum la mon-havanto parolas per la mono, sin gravigante.

GBEGLO Koffi/pg



Ĉi tiu forno uzas lignon, kiun oni braĝigas.



La surtablaj teleroj enhavas pastaĵon, saŭcon kaj akvon – kaj por trinki kaj por lavi la manojn.

# Bona betono

**H**ungara inventisto ellaboris betonon, kiu tralastas lumon. Optikajn fibrojn metis en betonon Losonczi [loŝonci] Áron, tiel ke tra muro videblas krepuska lumo, kvazaŭ en densa ĝangalo, kaj ombraj homaj siluetoj.

Multekostas betono tia, kaj ĝi estos uzata nur en eksterordinaraj konstruaĵoj. En Nov-Jorko oni ekzamenas la novan sistemon, kiu laŭ fakuloj donos anstataŭ sombreco ĝojon.

JUHÁSZ Károly/pg

## LITOVIO

### Efike studi

**L**itovajinoj, kiuj plezurigis virojn en Londono, Vieno, Milano aŭ Dubai, kapablas frenezigi ankaŭ profesorojn de superaj lernejoj de sia lando. Evidentiĝas, ke pluraj studentinoj sukcesas kunigi eksterlandan prostituadon kun enlanda studado en Litovio. Multaj celas prestiĝajn profesiojn: eble 70 % de litovaj prostituitinoj, laborantaj eksterlande, studas jurajn sciencojn.

Nuntempe superaj lernejoj en Litovio traserĉas la paĝojn de eksterlandaj agentejoj, kaj, se ili tie trovas foton de unu el siaj studentinoj, tiu ne plu rajtas reveni al la universitato. Pro tio la studentinoj ne volas, ke aperu publike iliaj fotoj. Ekzemple unu, pseŭdonime Jessica, sukcese petis, ke klubo en Aŭstrio forigu ŝiajn duonnudajn fotojn. La fotoj tamen reaperis en pornografia magazino en Amsterdamo.

Ankaŭ universitataj profesoroj enfalas la kaptilojn de siaj studentinoj kaj estas poste ĉantaĝataj – ekzemple por pagi la ŝuldojn de la koncerna studentino. Diris unu profesoro: „Pluraj estroj, ŝajnigante, ke nenio okazis, iusence defendas maldecajn studentinojn. Kaptitaj profesoroj malkuraĝe silentas, kio kontribuas al la sukcesa studodaŭro de tiaj studentinoj.”

LAST

## MEDICINO

### Fremdaj korpoj

**K**onsterniĝas medicinistoj, kiam en la korpoj de siaj pacientoj ili trovas objektojn, kiuj ne devus tie esti. Sed foje la homa korpo fariĝas stranga trezorejo. Ekzemple 41-jarulo el la litova urbo Jonava tenis dum 24 jaroj en sia korpo kateteron, etan plaston tubon postlasitan post operacio. Ĉe alia viro, pli juna, kiu eniris hospitalon post akcidento, kuracistoj trovis en la stomako horloĝon kun metala braceleto.

Aliaj objektoj eligitaj el homaj korpoj inkluzivas fajliletojn por purigi dentojn, protezojn kaj dentajn kronojn.

Aparte malliberuloj intence vundas sin, glutante pinglojn, razilojn, kulerojn, vinktojn aŭ najlojn. Kaj el la stomako de senhejmulo kuracistoj eltiris 23 rustiĝintajn partojn de matraco. En unu malsanulejo en Vilniuso dum la lastaj 15 jaroj pli ol 150 tiaj pacientoj estis kuracitaj.

LAST/pg



### Mortis Werner Schad

En marto mortis en Bariloche, Argentino, Werner Schad, unu el la plej oftaj kunlaborantoj de MONATO. Schad verkis por tre multaj rubrikoj (politiko, medio, ŝerco kaj satiro, hobia, spirita vivo), sed estis konata precipe pro siaj multnombraj vojaĝraportoj pri Sud-Ameriko. Li tre ŝatis la naturon, kaj per vortoj kaj fotoj sukcesis pludoni tiun amon al siaj legantoj. La lasta artikolo de Werner Schad en MONATO, Tondrulo aŭ montego de la Andoj, aperis en la februara numero de 2003.



## TRADICIOJ

# Priploru la krizan temon

**E**n la 19a jarcento en Japanio oni komencis ekspozicii pupojn, vestitajn per krizantemoj. Iom poste, antaŭ preskaŭ cent jaroj, parko en la urbo Hirakata fariĝis la ĉefa ekspoziciejo por vidi la krizantemajn pupojn. Tie, dum ora periodo inter 1930 kaj 1980, videblis aŭtune pli ol cento da naturgrandaj pupoj, aranĝitaj en trideko da scenejoj laŭ historia rakonto.

La ekspozicio estas ne simpla allogaĵo, sed tradicia distraĵo bazita sur kompleksa metiarto. Sed krizantemaj pupoj ne plu allogas sufiĉe da vizitantoj. Plie, la metiistoj maljuniĝis, kaj mankas spertaj posteuloj. Tial en 2005 oni decidis ĉesigi la 96-jaran tradicion de la ekspozicio en Hirakata.



*Krizantemistoj, el kiuj restas nur dek en Japanio, kreas bambuan framon, konforman al la vesto-formo, kaj enplektas la krizantemojn.*

### Bambua framo

Por organizi ekspozicion laboris diversaj metiistoj. Ĝardenistoj kreskigis krizantemojn specialajn kun fleksebla tigo por facila aranĝo. Pupistoj faris pupajn kapojn kaj membrojn, kaj dekoristoj konstruis la scenojn. Aparte gravis la tiel nomataj krizantemistoj, el kiuj restas nur dek en Japanio. Ili kreis bambuan framon, konforman al la vesto-formo kaj enplektis la krizantemojn.

Necesis cento ĝis ducento da kri-

zantemoj por unu pupo. La krizantemoj sur la pupoj ne estis tranĉitaj floroj, sed retenis siajn radikojn, ĉirkaŭitajn per akvoplenna musko. Regule akvumitaj, ili vivis dum pli ol unu semajno sur la pupoj.

Povas esti, ke eblos vidi unuopajn krizantemajn pupojn en aliaj partoj de Japanio. Sed la granda ekspozicio en Hirakata nun apartenas al la pasinteco.

HAYASI Kaneyuki

## JAPANIO

# Malmoda modelo

**F**ine de januaro estis arestita la 33-jaraĝa prezidanto de unu el la plej grandaj kaj riĉaj informteknologiaj kompanioj en Japanio. Horie Takahumi, la prezidanto de kompanio *Livedoor*, estas akuzita, ke li disvastigis falsajn informojn en la borso.

Horie ekfamiĝis en 2004, kiam li sensukcese provis aĉeti bankrotan basbalteamon. La sekvan jaron li gajnis ekvivalenton de pli ol 100 milionoj da eŭroj, akirinte preskaŭ duonon de la akcioj de filio de la televido-stacio *Fuji*. Samjare, en 2005, li sensukcese kandidatigis dum la naciaj elektoj kiel

sendependulo, tamen subtenis lin la reganta Liberala Demokrata Partio. Laŭdis lin la ĉefministro Koizumi, dirante, ke Horie estas modelo por gejunuloj.

### Fantoma kompanio

Komenciĝis lia kariero, kiam li studis en Tokio. Li fondis interret-kompanion kaj tiom prosperis, ke post dek jaroj li prezidis la *Livedoor*-grupon, kiu konsistas el pli ol 50 kompanioj. Tamen la grupo estas esence fantoma kompaniario, flosanta en la tiel nomata libera ekonomio: ĝi nenion produktas,

kaj 60 % de ĝia enspezo devenas de financaj transakcioj.

Pro la aresto de Horie la akcioj de *Livedoor* fariĝis preskaŭ senvaloraj: suferis finance 220 000 akciuloj. Pri la sorto de *Livedoor* kulpas la liberigo de la financa merkato, tiel ke pli facilas ekonomie konkuri, profiti – kaj bankroti. Pro tio en Japanio ekvideblas malmulte da riĉuloj kaj multe da malriĉuloj: malaperas la meza klaso. Socion tian – malhumanan, monadoran – kreis ĉefministro Koizumi kaj lia partio: sendube sekvos aliaj Horie-oj kaj aliaj *Livedoor*-skandaloj.

HORI Jasuo/pg



# „Malgranda estas bela”

**E**n lastatempa numero de irlandlingva ĵurnalo aperis artikolo pri Ernst Friedrich Schumacher [ŝúmaĥer], la aŭtoro de grava libro, kiu, kiam eldonita en 1973, provokis viglan diskuton, kiu eĉ hodiaŭ daŭras, almenaŭ en angleparolantaj landoj. Temas pri la verko *Small is Beautiful* (Malgranda estas bela), kies subtitolo estis „studado pri ekonomiko, kvazaŭ la homo gravus”.

En ĝi la aŭtoro argumentas, ke la homaro estas miskondukata per kulto de ekonomia kreskado; ke niaj problemoj kaj danĝeroj estas ne rezulto

de niaj malsukcesoj, sed de niaj sukcesoj; ke ni devas reorienti niajn celojn al la veraj necesoj de la homaro; ke ni obstine klopodu venki kaj superi la fragmentigon, kaŭzatan de faka specialistiĝo, precipe fare de ekonomiistoj, scienculoj kaj teknologiistoj.

Kontraste al la emo al gigantismo en la moderna socio, Schumacher pledas por socio, kiu respektu kaj antaŭenigu ĉion, kio estas eta, simpla, modesta kaj humana; kaj por io, kion li nomas „meza teknologio” aŭ „teknologio kun homa vizaĝo”. Per tiu termino li celas multtekostan teknologion, kiu povas esti uzata en evoluantaj socioj kaj de malriĉaj popoloj. Lia vizio estas diametre malsimila al la hodiaŭa okcidenta libermerkata tutmondiĝo. Kvankam lia libro estis eldonita antaŭ pli ol tridek jaroj, ĝi estas nun eĉ pli aktuala kaj pli urĝe bezonata, ol kiam ĝi estis verkita.

## Atentindaj libroj

E. F. Schumacher estis germandevena, sed venis en 1930 al Anglio por studi ekonomikon en Oksfordo. En la aĝo de 22 li instruis ekonomikon ĉe la Columbia-universitato en Nov-Jorko. Tamen li ne ŝatis teoriemi sen praktika sperto, do li forlasis la akademian vivon kaj dediĉis sin al komerco, agrikulturo kaj ĵurnalismo. Kiam eksplodis la dua mondmilito, li revenis al Oksfordo, kie li instruis dum kelkaj jaroj. De 1946 ĝis 1950 li servis kiel konsilanto pri ekonomio ĉe la brita reĝa komisiono en Germanio. Ekde tiam li agis kiel konsilanto al diversaj eksterlandaj registaroj. Intertempe li multe verkis. Du atentindaj libroj liaj estis *A Guide for the*

*Perplexed* (Gvidilo por konfuzitaj homoj) kaj *Good Work* (Bona laboro).

La pensoj kaj laboro de Schumacher, kiu mortis en Svislando en 1977, kongruis kun kaj aldonis al la revoluciaj teorioj, eldonitaj en 1941 de alia germanlingva ekonomikisto, nome Leopold Kohr, kiu naskiĝis en Salzburg, Aŭstrio, en 1909. Li instruis politikan filozofion en Usono, iĝis profesoro pri ekonomiko kaj publika administrado ĉe la Universitato de Puerto-Riko, kaj estis gastprofesoro diversloke, inkluzive de Kimrio, kie li lastatempe loĝis. Li verkis interalie *The Breakdown of Nations* (La disrompo de la nacioj), kiu aperis en 1957.


## Grandeco-teorio

Pri tiu ĉi verko mi skribis samtitolan artikolon, kiu aperis en MONATO 1989/5. En la artikolo mi menciis la tiel nomatan grandeco-teorion pri ekonomia mizero. Laŭ ĉi tiu teorio Kohr argumentis, ke la kaŭzo de multe da homa mizero en la moderna socio kuŝas en la trograndeco de ĝiaj institucioj: fabrikoj, instruejoj, sindikatoj, politikaj partioj, komercaj entreprenoj – kaj precipe en ŝtatoj.

Aliflanke, laŭ Kohr, kelkaj institucioj, instancoj kaj ŝtatoj povas esti tro malgrandaj por efike funkcii. Sed la ĉefa argumento de Kohr estas, ke ĉar la ŝtato estas la homa institucio, kiu plej forte tuŝas la vivon de la individuo, la mizero kaŭzata de la grandeco-faktoro, ne povas esti eliminata sen disrompo de la nacioj. Eble tia disrompiĝo ne forigus la tutan mizeron, ekzemple la milit-danĝeron, sed almenaŭ grandaj militoj ne okazus, kaj se la koncernaj ŝtatoj estus sufiĉe malgrandaj kaj sufiĉe kontentaj, ili ne militus.

## Totala sendependeco

Ŝajnas nun, kiel mi notis en 1989, ke la ideoj de Kohr komencas



*Leopold Kohr argumentis, ke la kaŭzo de multe da homa mizero en la moderna socio kuŝas en la trograndeco de ĝiaj institucioj.*

plenumiĝi. Mi skribis tiam: „Subite kaj spontanee, en ĉiu parto de la mondo, etnaj popoloj, kiuj estis integritaj (ofte malvolonte) en vastajn superŝtatojn, postulas por si mem lingvaj rajtojn, respekton al siaj tradicioj kaj aŭtonomion aŭ totalan sendependecon. Ni observas tiun fenomenon samtempe en la respublikoj de Sovetio, en Jugoslavio, en Britio kaj Nord-Irlando, en Tibeto, inter la indiĝenaj triboj de Ameriko, en Hispanio, inter polinezianoj ...”

Sed ni revenu al Schumacher, kies mencio en la ĵurnalo memorigis min, ke mi lin renkontis. Iam, en la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento, amiko mia, redaktoro de loka ĵurnalo en Skotlando, petis, ke mi iru al internacia konferenco en Londono kaj verku raporton. La temo de la konferenco estis „La estonteco de malgrandaj nacioj”, kaj la prelegantaro inkluzivis Schumacher, Kohr kaj Gwynfor [gŭinvor] Evans, gvidanton de la nacia partio de Kimrio *Plaid Cymru* [plajd kimri].

### Abundaj ekzemploj

Dum la konferenco la prelegantoj ilustris per abundaj ekzemploj la ideojn en siaj skribaĵoj. Mi trovis ĉiujn prelegojn profunde interesaj. Iliaj ideoj tiom impresis min, ke ne estas troigo aserti, ke ili kontribuis al la modlado de miaj propraj mondkoncepto kaj ideologio (se ne estas tro pretendeme apliki tiajn terminojn al miaj ne tro koheraj ideoj).

Inter kaj post la prelegoj mi havis okazon konversacii dum longa tempo kun Schumacher kaj Evans, du el la plej simpatiaj, modestaj kaj sinceraj homoj, kiujn mi iam renkontis. Imponis al mi, ke ili, kvankam gravaj en siaj respektivaj kampoj de aktiveco, trovis tempon por tiom interŝanĝi ideojn kun juna, tute negrava persono kiel mi. Estis evidente, ke ili, kune kun Kohr, estis homaramaj kaj grandanimaj.

### Kreskad-iluzio


En Irlando, kie mi nun loĝas, ideoj kaj praktikoj similaj al tiuj de Kohr kaj Schumacher estas rekomendataj kaj efektividataj de angla ekonomikisto Richard Douthwaite [riĉard daŭtŭejt] kaj inspiras grandan nombron da adeptoj. Eble lia plej influhava verko

estas *The Growth Illusion* (La kreskad-iluzio).

Kiam miaj filoj petis min rekomendi nemalhaveblajn librojn por serioza legado, mi menciis la verkojn de Kohr kaj Schumacher, kune kun *Ich und Du* (Mi kaj vi) de Martin Buber, *Walden* de la usona verkisto Henry David Thoreau (havebla en Esperanto sub la titolo *Pensoj el Valdeno* en traduko de B. McClafferty kaj eldonita en Toronto en 1973), *Meditaĵoj* de Marcus Aurelius Antoninus – kaj, kompreneble, la skribaĵoj de L. L. Zamenhof.

La pensoj de tiuj grandaj viroj povus formi mapon por gvidi la homaron al pli humana, pli saĝa kaj pli feliĉa mondo. Bedaŭrinde, kiel spertis Kasandro, ne sufiĉe da homoj estas sufiĉe saĝaj kaj humilaj por aŭskulti ties voĉojn.

Garbhan MACAOIDH



La ĉefverko de Ernst Friedrich Schumacher: *Small is Beautiful* (Malgranda estas bela).

# DONACKUPONO

**Donaco por via korespondamiko?**

**Donaco por la amikoj de Pasporta Servo kiuj tiel afable gastigis vin?**

**Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?**

**NOVAĴO**

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

### Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **11,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **23 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **46 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete ĉe [monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)







© OT - ALEX HÉRAUL

# Vizito al Novarto- urbo Nancy



La Stanislavo-placo



Dum la jaroj 1890-1900 en eŭropa arto kaj arkitekturo furoris tute nova stilo. Ĝi iom variis laŭ regionoj kaj havas diversajn nomojn. Plej konataj estas *Art nouveau* en la franca kaj *Jugendstil* en la germana. En Esperanto ĝi estas nomata „Novarto”. Pro ĝi famiĝis la grandurboj Parizo, Bruselo, Barcelono kaj Prago. Tamen la stilo influis ankaŭ malpli gravajn kaj internacie malpli konatajn urbojn kiel ekzemple Rigo, la ĉefurbon de Latvio, kaj Nancy, urbon en nord-orienta Francio.





#### Utilaj retadresoĵoj de Nancy:

- [www.ot-nancy.fr/index.php](http://www.ot-nancy.fr/index.php):  
turisma servo de Nancy (parte en Esperanto);
- [www.nancy.fr/actualites/webcambd.htm](http://www.nancy.fr/actualites/webcambd.htm):  
Stanislavo-placo;
- [www.tourisme.fr/office-de-tourisme/luneville.htm](http://www.tourisme.fr/office-de-tourisme/luneville.htm):  
turisma servo de Lunéville;
- [www.ot-toul.fr](http://www.ot-toul.fr):  
turisma servo de Toul.

**M**i vizitis Nancy [nansi] antaŭ kelkaj jaroj, sed en ekspozicio en Bruselo mi ekkonis ĝian rolon en Novarto. Ĉar dum la tuta pasinta jaro abundis gazetaj artikoloj kaj televidaj programoj pri tiu urbo, mi decidis viziti ĝin en septembro.

#### Historio

Nancy unufoje estis menciita en la jaro 1073, kiam la dukoj de Loreno elektis ĝin kiel sian ĉeflokon. Dum la jarcentoj ĝi konis periodojn de granda prospero kaj de ruiniĝo. Fine de la 16a jarcento apud la malnova urbo estis konstruita nova urbo kun rektliniaj stratoj. En sekva militperiodo oni grandparte detruis ĝin.

Glora epoko venis en 1735, kiam Stanislavo, eksa reĝo de Pollando, danke al la franca reĝo Ludoviko la

15a (kies edzino estis filino de Stanislavo) iĝis duko de Loreno. La duko ne havis politikan povon, sed disponis pri grandaj financaj rimedoj, kiujn li elspesis por scienco, arto kaj arkitekturo.

#### Muzeo pri belartoj



Li preskribis, ke inter la du urboj oni kreu novan „reĝan placon”. Ĝi nun nomiĝas Stanislavo-placo kaj estas ĉefloko de la urbo. En 1766, post la morto de Stanislavo, Loreno iĝis parto ►



Domo en Lunéville

► de Francio, kaj Nancy restis provinca urbeto.

La urbo denove akiris pli grandan rolon fine de la 19a jarcento, pro la daŭra minaco de milito inter Francio kaj Germanio. Tiutempe multaj industriistoj transloĝiĝis de la landlima regiono al la pli sekura Nancy, translokante tien ankaŭ siajn fabrikojn kaj kapitalojn. La urba loĝantaro rapide kreskis (de 50 000 en 1870 al 120 000 en 1911). La riĉula klaso volonte elspesis monon por prestiĝaj konstruaĵoj komercaj kaj privataj en la nova stilo, kiu furoris en la franca ĉefurbo Parizo. Rezulte de tio multaj Novarto-metiistoj ekloĝis en tiu regiono.

Nun du elementoj favoras la turisman disvolviĝon de la urbo. Unue, Unesko en 1983 deklaris la Stanislavo-placon tutmonda kultura heredaĵo kaj okaze de la 250a datreveno de ties inaŭguro (2005) ĝi nuntempe estas tute renovigita. Due, la ŝatantoj de Novstilo ekinteresiĝis pri malgrandaj urboj kiel Nancy.

### Alveturo

Nancy facile atingeblas per aŭto de Parizo kaj Luksemburgo. Ankaŭ trajne estas bonaj ligoj, sed la urbo ne troviĝas ĉe la plej gravaj fervojlinioj kaj eble necesas ŝanĝi trajnon dumvoje. Ĉar mi kombinis la ekskurson al Nancy kun alia vizito, mi alvenis aŭte. Mi bone planis la sekvendan itineron al hotelo en la malnova urbo, sed tamen eraris kaj nur post longa serĉado atingis ĝin. Tial preferindas lasi la aŭton en publika parkejo rande de la urbo.

Mia unua plentago surloke estis mardo. Evidentiĝis tamen, ke tio estas la ĝenerala fermotago de muzeoj en Nancy. (En mia hejmlando Belgio la fermotago estas lundo). La septembran semajnon, kiun mi elektis (ne tute libere, ĉar miaj ferioj ja dependas de oficejaj cirkonstancoj) estis post la someraj, sed antaŭ la aŭtunaj ekspozicioj. En tiu periodo kelkaj lokoj, kiujn mi intencis viziti, estis fermitaj aŭ nur parte alireblaj. Jen duobla pruvo, ke zorga preparo de vojaĝo utilas ...

### Vidindaĵoj

Pro la fermo de la muzeoj, marde mi vagadis tra la urbo kaj admiris la Novarto-domojn. En la urbocentro ili ne tre multas. Tie precipe vidindas komercaj konstruaĵoj, ekzemple la fasadoj kaj ĝicetaj haloj de bankoj. La loĝdomoj troviĝas dise ekster la urbocentro. Nur la kvartalo Saurupt estas tute en la nova stilo. Ĉar tiun tagon regis bela vetero, iĝis agrabla plurkilometra promenado. Se estus malbona vetero, oni ne kapablus longe piediri, kaj tia vizito estus certe problema. Mi dubas, ke la konsilo de mia gvidlibro uzi publikan transporton estas realeca. Por grup(et)o ekzemple utilis lui buseton. Muzeo de la Skolo de Nancy – en kiu estas la plej belaj verkoj de lokaj Novarto-metiistoj – bedaŭrinde estis fermita pro preparo de okazonta ekspozicio. Muzeo pri la Historio de Fero – ankaŭ grava pro Novarto – estas tro malproksime de la urbocentro, kaj ne eblis atingi ĝin piede.

Muzeo pri Loreno, lokita en la iama

duka palaco kaj apudaj konstruaĵoj urbocentre, havas grandegajn historiajn kolektojn de eksponaĵoj de la pratempo ĝis la 20a jarcento, de kamparanaj ĝis judaj objektoj. Kvankam la kolekto estas valoraj kaj interesaj, ilia prezentado iĝis malmoderna. Mi rimarkis kelkajn klarigajn ŝildojn tiel malnovajn, ke ili mem aspektis kiel historiaĵoj. Oni konscias pri tio, kaj planoj por ĝisfunda renovigo jam pretas.

Kompreneble, multajn rimedojn dum la pasintaj jaroj oni elspesis por la Stanislavo-placo, kiu okaze de la festa jaro 2005 transformiĝis de ĉefpunkto de la urba aŭtotrafiko al bela, prestiĝa zono por piedirantoj. Vere ĝi estas unu el la plej belaj lokoj, kiujn mi iam vidis. Mi povis ĝui eksterordinaran vesperan viziton al la urbodomo. Sur la placo ankaŭ estas Muzeo pri Belartoj. Mia vizito al ĝi estis iom malhelpita pro la rearanĝo post ĵus finiĝinta ekspozicio. En ties keletaĝo videblas la fundamentoj de fortikaĵoj, kiuj iam defendis la urbon kaj super kiuj estas konstruita la placo.

### En la regiono de Nancy

Mi pasigis tri plenajn tagojn en Nancy kaj opinias, ke tio sufiĉas por trankvile rigardi ĉiujn vidindaĵojn. Se oni disponus pri sufiĉe da tempo, certe oni trovus je kelkdek kilometra distanco aliajn vidindajn lokojn, kiuj taŭgas por unutaga ekskurso.

Oriente de Nancy estas Lunéville, la vera rezidejo de Stanislavo. Tie li konstruigis „malgrandan Versajlon” (laŭ la ekzemplo de la fama rezidejo de francaj reĝoj apud Parizo). Antaŭ kelkaj jaroj estis granda incendio en ĝi, kaj nun nur ties parto viziteblas.

Okcidente de Nancy estas Toul, urbo kun origino de la kelta kaj romia epokoj, situanta ĉe kruciĝo de pluraj gravaj vojoj. Ĝis 1777 ĝi estis episkopa urbo. Poste Toul malprogresis, sed multaj historiaj konstruaĵoj en ĝi konserviĝis.

Sude, en Xaronval (apud la departementa vojo D33, inter Charmes kaj Mirecourt) dum someraj dimanĉoj eblas ĝui la etoson de vilaĝo el la jaro 1900.

Roland ROTSAERT



INTERRETO

# Katalunoj, sed ne katoj

La 13an de februaro, precize je la 17a laŭ kataluna tempo, ekfunkciis la interreta finaĵo .cat por la „kataluna lingva kaj kultura komunumo”. Unuafoje kultura komunumo, principe ne ligita kun difinita teritorio, ricevas tian agnoskon de ICANN, la internacia organizaĵo kun sidejo en Kalifornio, kiu kunordigas la sistemon de retnomaj finaĵoj en Interreto.

La klopodoj komenciĝis en 1996, kiam ekestis la unuaj agadoj por postuli la teritorian finaĵon .ct, analogan al tiu de aliaj landoj – ne ĉiam sendependaj, kiel ekzemple Gronlando, kiu havas la finaĵon .gl. Tiuj klopodoj malsukcesis pro la rekta kontraŭstaro de la tiama dekstrisma hispana registaro, pro kio la aktivuloj iom ŝanĝis sian celon: ricevi tri-literan finaĵon en periodo, kiam ili plivastiĝas.

La asocio *Punt CAT* (Punkto CAT) kreiĝis fine de 2001 kaj post kelka tempo lanĉis kampanjon por peti la finaĵon .cat. Superante la plej optimismajn antaŭvidojn, al la cento da fondintaj organizaĵoj aliĝis 68 000 unuopuloj, asocioj kaj entreprenoj de la Katalunaj Landoj kaj de katalunaj komunumoj en eksterlando.

La peto estis deponita ĉe ICANN en marto 2004, kun akompanaj argumentoj, informoj pri la ekonomia efektiveblo kaj teknikaj detaloj. Fakte ICANN „taksis tre pozitiva” la grandan subtenon de la kataluna komunumo al la kandidateco, kiu estas „grava kondiĉo por favore konsideri la proponon de finaĵo”. Dek ok monatojn poste, kiam nur tri el la tiamaj dek kandidatoj de „sponsoritaj finaĵoj” estis akceptitaj, la kataluna propono sukcesis.

Povos ricevi la finaĵon iu ajn TTT-ejo en rilato kun la katalunaj lingvo kaj kulturo, kvankam ne nepre en la kataluna: ekspozicio pri valenciaj pentristoj en Hamburgo en la germana estus tute taŭga kandidato, sed interreta vendejo el Barcelono ne estos akceptita, se ĝi ne vendas siajn varojn en la kataluna (kaj eventuale ankaŭ en aliaj lingvoj). Ne povos ricevi .cat-finaĵon, pro postulo de ICANN, paĝoj pri katoj



Barcelono, placo Espanya

luna: ekspozicio pri valenciaj pentristoj en Hamburgo en la germana estus tute taŭga kandidato, sed interreta vendejo el Barcelono ne estos akceptita, se ĝi ne vendas siajn varojn en la kataluna (kaj eventuale ankaŭ en aliaj lingvoj). Ne povos ricevi .cat-finaĵon, pro postulo de ICANN, paĝoj pri katoj

(cat en la angla). Krom se temas pri katoj, miaŭantaj katalune.

La iniciatintoj de la nova refinaĵo deklaris, ke post la ekfunkcio de .cat ili reentreprenos la batalon por la finaĵo .ct. La nova hispana registaro, socialisma, montras sin pli favora al tiu ebleco.

Hektor ALOS I FONT





# Nova etapo en biologio kaj medicino



**E**n 1944 la tiam ankoraŭ malmulte konata bakteriologo Oswald Theodore Avery [éjveri] unufoje montris, ke la genetika informo en ĉiuj vivaĵoj estas kodita ne en proteinoj (kiel antaŭe opiniis ĉiuj biologoj), sed en molekulo de DNA (desoksiribonukleata acido). Tio estis la grandega epoka malkovro, kiu, mi opinias, eĉ estas pli grava, ol la sekvontaj sciencaj atingoj pri deĉifrado de la genetika

kodo, ĉar ĝi plene ŝanĝis la pensadon de sciencistoj. Kaj, certe, Avery meritis ricevi la Nobel-premion, kio bedaŭrinde ne okazis. Kvankam poste estis malkovrite, ke en multaj virusoj genetika informo povas esti kodita en RNA (ribonukleata acido), tutegale la esenco de la malkovro de Avery ne ŝanĝiĝis: la portantoj de genetika informo estas nukleataj acidoj. Kaj tial sciencistoj estis tiam konvinkitaj, ke ĉiuj agantoj

kaŭzantaj infektajn malsanojn (bakterioj, klamidioj, protozooj, virusoj ktp) devas enhavi DNA kaj/aŭ RNA. Sed en la 80aj jaroj de la 20a jarcento la elstara usona sciencisto Stanley B. Prusiner konstatis, ke ekzistas infektaj malsanoj, kaŭzigitaj de proteinaj partikloj. Multaj eĉ eminentaj sciencistoj komence malkonsentis, ĉar tio estis nova renverso en biologio kaj medicino. Tamen la multfojaj kaj multjaraj kontroloj ne povis evidentigi eĉ restaĵojn de nukleataj acidoj en tiuj ĉi proteinaj partikloj. Krom tio estis montrite, ke infektaj proteinaj partikloj estas kapablaj reproduktiĝi sen partoprenado de DNA aŭ RNA. En 1997 Prusiner iĝis laŭreato de la Nobel-premio pri fiziologio kaj medicino.

Laŭ propono de Prusiner, tiu proteina partiklo estis nomita „*prion*” (esperante: „priono”). La termino „priono” estas ŝanĝita mallongigo de la angla esprimo „*proteinaceous infectious particle*” (proteina infekta partiklo).

Studado de la malsanoj, el kiuj multaj poste estis nomitaj „prionaj”, komenciĝis en 1954, kiam Björn Sigurdsson resumis la rezultojn de siaj dudekjaraj esploroj pri tiel nomataj malrapidaj infektoj de ŝafoj kaj kaproj, el kiuj la plej konata kaj disvastiĝinta estis ŝaftremo aŭ skrapio (angle: „*scrapie*” [skreĵpi], france: „*tremblante du mouton*”). Baldaŭ en tiun grupon de infektoj oni enigis la infektan anemion de ĉevaloj, la afrikan febron de porkoj, la subakutan sklerozigan panencefaliton de homoj (malofta komplikaĵo post morbito), la malsanon kuruo de aborigenoj de Nov-Gvineo kaj multajn aliajn malsanojn. Komence oni opiniis, ke ĉiuj similaj infektoj estas virusaj, kaj tial

ili nomiĝis „malrapidaj virusaj infektoj”. Por ili estis karakterizaj multjara inkubacia periodo, malrapida pligraviĝo de la malsano, neevitebla mortiga fino. Poste, rezulte de esploroj de Prusiner kaj de aliaj sciencistoj, evidentiĝis, ke kaŭzoj de multaj el malrapidaj infektoj estas ne virusoj, sed prionoj. Nuntempe inter prionaj malsanoj estas multaj malsanoj de bestoj: ŝaftremo, bova spongeca (spongoforma) encefalopatio (bovofrenezo), spongeca encefalopatio de katoj, hufuloj, transdonebla encefalopatio de lutreoloj ktp, kaj kvar malsanoj de homo: Creutzfeldt-Jakob-malsano, kuruo, sindromo de Gerstmann-Sträussler-Scheinker kaj fatala familia insomnio (sendormeco). Por ĉiuj prionaj malsanoj estas karakterizaj spongecaj kavoj en la cerbo surloke de detruitaj neŭronoj (nervaj ĉeloj). Tial la malsanoj nomiĝas „transdoneblaj spongecaj encefalopatioj”.

Prusiner kaj aliaj sciencistoj montris, ke en ĉiuj mamuloj kaj iuj aliaj vivaĵoj ekzistas neinfekta (aŭ ĉela) priona proteino, kiun oni markas per „PrP<sup>C</sup>”, kie „C” signifas angle „*cell*” (ĉelo). La infektan (aŭ patogenan) prionan proteion oni signas per „PrP<sup>Sc</sup>”, kie „Sc” estas la du komencaj literoj de la angla vorto „*scrapie*”.

### Unika formo de prionoj

Infektaj prionoj estas eksterordinare rezistaj al eksteraj efikoj: ili ne pereas rezulte de ultraviola radiado, desinfektado per kutimaj rimedoj kaj longa boligado (nur unuhora efiko de temperaturo pli ol 135 gradoj celsiaj estas pereiga por ili). Sciencistoj montris, ke kvankam la ĥemia strukturo de normalaj kaj infektaj prionoj ne diferencas inter si, tamen ekzistas grandaj diferencoj en la spaca dispozicio de la molekuloj (en la terciara strukturo de proteinoj). Normalaj prionoj havas 42 % de tiel nomataj alfa-spiraloj, kaj nur 3 % de beta-plataĵoj (rubandoj), sed la infektaj prionoj estas malpli spiralfarmaj: ili havas nur 30 % de alfa-spiraloj sed 43 % de beta-plataĵoj.

Hodiaŭ ne estas evidenta la funkcio de neinfektaj, aŭ normalaj, prionoj. Oni supozas, ke prionoj partoprenas metabolon, cerebelan reguladon de



kunordigo, funkciadon de nervaj ĉeloj, sinapsoj; ankaŭ atentindas la rolo de prionoj en regulado de cirkadiaj (tagnoktaj) ritmoj ktp. Ekzistas specifa geno, kiu kudas la sintezon de normalaj prionoj. En la homa organismo ĝi troviĝas en la 20a kromosomo. La mutacio de tiu ĉi geno alkondukas al formado de patologiaj prionoj, kiuj kaŭzas, ekzemple, la heredan formon de Creutzfeldt-Jakob-malsano. Tamen plimulto da prionaj malsanoj aperas rezulte de infektado per patologiaj prionoj.

Ĝis nun estas diskuteble, kiamaniere reproduktiĝas la infektaj prionoj. Kiel montris Prusiner kaj aliaj sciencistoj, normalaj prionoj, sub la influo de la senpera kontakto kun proteinaj partikloj de infektaj prionoj, transformas sian spacan (terciaran) strukturon, aliformiĝas kaj fariĝas infektaj. Amasiĝo de patologiaj prionoj okazas laŭ geometria progresio. Pro tio, ke infektaj prionoj ĥemie ne diferencas de normalaj, ili ne estas submetataj al pereiga efiko de la imuna sistemo kaj de interferonoj. Por prionoj estas karakterizaj la inter-speciaj diferencoj, kiuj tamen ne estas absolutaj. Tial, ekzemple, la infektaj prionoj de bova spongeca encefalopatio povas kaŭzi la malsanon de homoj ktp. Sube mi tre mallonge karakterizos iujn prionajn malsanojn de bestoj kaj homoj.

### Ŝaftremo

La plej konata kaj studita estas la priona malsano de ŝafoj kaj kaproj

„ŝaftremo” aŭ „skrapio”. Sciencistoj eĉ opinias, ke ŝaftremo estas la „praavo” de ĉiuj prionaj malsanoj de bestoj kaj homoj. Ŝaftremo estas konata en Britio jam preskaŭ 300 jarojn. Alia nomo de ŝaftremo estas „skrap-malsano”. Pro netolerebla haŭta juko, karakteriza por la malsano, la bestoj frotiĝas kontraŭ ĉiuj malmolaj objektoj kaj fariĝas tre ekscititaj. Baldaŭ ĉe ili aperas ŝanceliĝema irmaniero, kaj la bestoj jam ne povas stari. Post kelkaj jaroj la malsanaj bestoj pereas. En la cerbo de la malsanaj kaj mortintaj bestoj estas trovitaj multnombraj spongecaj kavoj sur la loko de detruitaj nervaj ĉeloj kaj amasiĝoj de la proteino ameloïdo (ameloïdaj plakaĵoj), kiuj enhavas grandan kvanton da infektaj prionoj. Krom en la cerbo, tiuj prionoj povas aperi en limfonodoj, lieno, okulbulboj, intestaro ktp. La ŝafoj kaj kaproj infektigas precipe sur paŝtejoj kaj en bienoj, kiuj restas kontaĝaj longan tempon post ĉeestado de la malsanaj bestoj. Nuntempe ŝaftremo estas disvastiĝinta en multaj landoj de ĉiuj kontinentoj krom Aŭstralio. Por la prevento de la malsano necesas rigoraj kvarantenaj kaj profilaktikaj rimedoj: la frua evidentigo de la malsanaj bestoj, neniigo de la grego, kie estis registrita almenaŭ unu malsana besto, desinfektadoj, malpermeso uzi la paŝtejon, kie paŝtiĝis malsanaj bestoj, ktp.

Sed ŝaftremo estas danĝera ne nur por ŝafoj kaj kaproj. Sciencistoj malkovris, ke ŝaftremo fariĝis la fonto de infektado por multaj aliaj bestoj. ▶

► Malraciaj kaj nepripensitaj agadoj de homoj, kiuj uzis kiel aldonan proteinan nutraĵon al bestoj nesufiĉe desinfektitajn ostodevenan farunon kaj viandajn restaĵojn, fabrikatajn el kadavroj de ŝafoj kaj kaproj, kiuj estis infektitaj de ŝaftremo, alkondukis al la amasa disvastiĝo de prionaj malsanoj inter bovoj, katoj, lutreoloj, hufuloj ktp.

### **Bovofrenezo**

En 1985-1986 en Anglio aperis informo pri malsaniĝo de bovoj per la bova spongeca encefalopatio. En la sekvaj jaroj la kvanto de malsanaj bestoj multe pligrandiĝis. La simptomoj de la malsano kaj patologiaj ŝanĝoj en la cerbo de malsanaj kaj mortintaj bestoj estis preskaŭ similaj al tiuj de ŝaftremo. Maksimuma kvanto de infektaj prionoj aperis en la cerbo de bovoj. Infektaj prionoj estis trovitaj ankaŭ en limfonodoj, lieno, intestaro kaj – kio precipe gravas – en muskoloj de bestoj.

En 1988-1990 finfine estis oficiale malpermesita nutrado de bovoj per ostodevena faruno kaj viandaj restaĵoj de bovoj kaj ŝafoj. Tamen pro la longa inkubacia periodo la malsaneco de bovoj en Britio plu pligrandiĝis ĝis 1992, kiam dum unu jaro estis registritaj preskaŭ 40 000 malsanaj bovoj. Krom Britio, bova spongeca encefalopatio aperis en multaj (precipe eŭropaj) landoj: Irlando, Svislando, Francio, Portugalio, Germanio kaj aliaj. Lastatempe malsanaj bestoj estis registritaj en Japanio, Kanado, Usono kaj aliaj landoj. Estis ekstermitaj milionoj da bovoj, kies kadavroj estis forbruligitaj en specialaj fornoj. En multaj landoj estis starigita embargo rilate al bovoj kaj bovaĵo el endemiaj landoj.

### **Prion-malsano ĉe homoj**

En 1994-1995 en Anglio estis diagnozitaj kelkaj kazoj de Creutzfeldt-Jakob-malsano ĉe junaj personoj. Ĝis 1997 la nombro de tiaj malsanuloj superis dudekon, kio estis mirinda, ĉar antaŭe konataj sporadaj kaj heredaj kazoj de la malsano estis tre maloftaj kaj ĝis tiam malsaniĝis precipe maljunaj personoj. Baldaŭ estis malkovrite, ke tiuj ĉi malsanuloj verŝajne malsaniĝis

rezulte de manĝado de bovaĵo, infektita de prionoj de bova spongeca encefalopatio (la prionoj estis identigitaj post eksperimenta infektado de musoj). La malsano komenciĝis post longa inkubacia periodo. Ĉe malsanuloj aperis kapturniĝo, depresio, malboniĝo de memorkapablo, ŝanceliĝema irmaniero. Poste estis evidentaj pli gravaj simptomoj: konvulsioj, paralizoj, patologiaj refleksoj, demenco kaj aliaj. Post unu-du jaroj malsanuloj pereis. En la cerbo de la mortintoj estis aperintaj ŝanĝoj, tipaj por la prionaj malsanoj: spongecaj kavoj sur la loko de detruitaj nervaj ĉeloj, ameloidaj amasiĝoj ktp.

Ĝis nun sciencistoj diskutas pri la ebla kvanto de homoj, infektitaj de prionoj de bova spongeca encefalopatio. Iuj parolas pri malgranda probablo de la infektado, sed aliaj supozas, ke jam kelkaj miloj da homoj troviĝas en inkubacia periodo. La realaj ciferoj de la malsanuloj nuntempe verŝajne superas 100 kazojn.

Sciencistoj nomis tiun ĉi malsanon nova varianto de Creutzfeldt-Jakob-malsano, ĉar ĝis tiam estis konataj tri aliaj variantoj: sporada, hereda (rezulte de genaj mutacioj) kaj iatrogena (greka „*iatros*” signifas „kuracisto”) (rezulte de nesufiĉe sterilaj medicinaj manipuladoj). Estas konataj la kazoj de infektadoj per prionoj pro malbone sterilizitaj kirurgiaj instrumentoj, elektrodoj, post transplantado de infektitaj korneo, malmola cerba membrano ktp. Pli oftaj estas infektigoj rezulte de uzado de hormonoj, ricevataj el hipofizo, ktp. Estas aperintaj kazoj de infektigo de neŭrokirurgoj, anatomiistoj ktp. Nuntempe necesas esti tre singarda, por ne infekti homojn per prionoj rezulte de uzado de sango, serumo, fermentoj, hormonoj ktp de bovoj ĉe fabrikado de medikamentoj kaj ŝmiraĵoj, atentante la ekstreman rezistecon de infektaj prionoj al steriligado. Estas danĝera ankaŭ la sango de homoj, portantoj de patologiaj prionoj.

Alia priona malsano, kuruo, estis endemia nur inter aborigenoj de Nov-Gvineo. En 1957 la usona pediatro kaj epidemiologo D. Carleton Gajdusek malkovris, ke precipe malsaniĝis indiĝenoj de la tribo „Fore”,

kiuj manĝadis pro ritaj celoj la cerbon kaj viscerojn de mortintaj parencoj, el kiuj multaj estis infektitaj de prionoj. La malsano komenciĝis post la multjara inkubacia periodo. Simptomoj de kuruo estis similaj al tiuj de aliaj prionaj malsanoj. Krome, por kuruo – pro la psikaj perturboj – estis karakteriza senkaŭza rido, kaj tial la malsano estis nomita „ridega morto”. La malsanuloj mortis kutime post unu-tri jaroj. Rezulte de esploroj de Gajdusek la rita kanibalismo en Nov-Gvineo estis malpermesita, kaj novaj infektadoj plene ĉesis. En 1976 Gajdusek ricevis la Nobel-premion pri fiziologio kaj medicino.

La aliaj supre menciitaj prionaj malsanoj de homo estas tre maloftaj (unu inter dek milionoj da loĝantoj). Ili estas heredaj, kaŭzitaj de genaj mutacioj kaj same mortigaj.

Ĝis nun ne ekzistas efikaj rimedoj por la kuracado de prionaj malsanoj. Precipe oni uzas medikamentojn, kiuj plifaciligas la staton de malsanulo kaj malrapidigas la malfavoran evoluon de la malsano (steroidaj hormonoj, antibiotikoj, apartaj kontraŭmikozaj medikamentoj ktp). Lastatempe sciencistoj en Britio montris favoran efikon de iuj fenotiazinoj, en Italio „tetraciklinoj”, en Usono „akrikino”. Sed tiuj atingoj ankoraŭ estas provizoraj. Plej gravas la preventado de la malsanoj per rigoraj kvarantenaj kaj profilaktikaj rekomendoj.

### **La estonteco**

Esplorado pri prionoj kaj prionaj malsanoj bone progresas. Multo ankoraŭ ne estas konata. Eble tiuj ĉi esploroj lumigos iujn aliajn malbone studitajn malsanojn, ekzemple la malsanon de Alzheimer. Povas esti, ke la prionaj partikloj kuŝis en la bazo de la unuaj vivaj estaĵoj sur nia planedo kaj reproduktiĝis simile al infektaj prionoj. Oni povas konvinkiĝi, ke baldaŭ estos trovitaj efikaj medikamentoj por kuracado de prionaj malsanoj. Nuntempe necesas pli efike protekti sin kaj defendi bestojn kontraŭ akireblaj prionaj malsanoj. Necesas esti pli prudenta kaj singarda antaŭ ellaborado de novaj teknologioj por ne provoki novajn tiajn danĝerajn epidemiajn malsanojn.

Vladimir LEMELEV



NEPALO

# La malgranda Budho

Meze de marto la gazetaro anoncis la malaperon de Ram Bahadur Bamjan, alinomata „la malgranda Budho”. Iom poste *BBC* anoncis, ke Bed Bahadur Lama, prezidanto de la budhana asocio *Om Namō Buddha Tapaswi Sewa Samiti* parolis kun li, kaj ke li diris, ke liaj gepatroj ne timu, kaj ke li revenos post 6 jaroj. La jenan artikolon skribis nepala kunlaboranto de *Monato* kelkajn tagojn antaŭ la malapero de la knabo.

**E**n la vilaĝo Ratanapuri de la Bara-distrikto, kiu situas preskaŭ 100 km sude de Katmando, daŭras la meditado de 16-jara knabo. Lia nomo estas Ram Bahadur Bamjan'. Li silente sidas sub arbo kun siaj kruroj krucitaj de la 17a de majo 2005. Li nek parolas, nek staras, nek manĝas, nek trinkas eĉ akvon. Li nur sidas kun fermitaj okuloj kaj fermita buŝo. Li meditas. Li estas vestita nur en blanka ŝalo. Liaj longegaj haroj kovras liajn okulojn. Multaj homoj vizitas la lokon kaj, vidante lin, donis al li la nomon „la malgranda Budho”.

Antaŭ pli-malpli 2600 jaroj ankaŭ la Granda Budho, forlasinte sian palacon kaj familianojn meditis same. Budho atingis la nirvanan staton meditante dum longa tempo.

Ram Bahadur Bamjan' vizitis Lumbini, kiu estas 250 km okcidente de Bara, kaj li komencis meditati reveninte de Lumbini. Li jam meditas nun naŭ monatojn kaj volas daŭrigi dum 6 jaroj. Lia patrino ankaŭ nomiĝas Mayadevi, same kiel la patrino de Budho nomiĝis Mayadevi. Lia patrino svenis, sed la knabo volas mediti ses jarojn kaj atingi la grandan nirvanon, same kiel Gotamo Budho atingis nirvanon antaŭ 2600 jaroj.

Li estas la kvina filo de Mayadevi, kiu havas sep filojn. Ĉiutage multaj homoj vizitas la lokon. Oni nur povas vidi lin de 50 metroj, ĉar multaj vizitas



lin, kaj liaj familianoj aranĝas ĉion tiel, ke la homoj ne ĝenos lin. Oni diras, li nur parolis aŭ kriis unu fojon, kiam serpento mordis lin.

Kuracistoj kaj sciencistoj volas diagnozi lin sen ĝeni al lia meditado.



Sed kiel? Tio estas vera defio. Kiam ribeloj denove ĝenos, kiel ofte okazas en Nepalo, eble la knabo trovos novan metodon por paco kaj amikeco. Eble iam li estos pli granda Budho!

Navin Lal SHRESTHA

## MADAGASKARO

# Ŝtatlaikeco minacata

**K**iu ajn estas la regantoj en Madagaskaro, la Monda Banko (MB) kaj la Internacia Mona Fonduso ĉiam havas bonegajn rilatojn kun ili, ĉar ili sekvas laŭvorte la drastajn kondiĉojn, postulatajn de ambaŭ institucioj. Ĉio aspektas normale ĝis tiu ĉi punkto, sed kiel sin teni, kiam la loka reprezentanto de MB ekzemple publike deklaras personan apogon al la nuna prezidento? Kio des pli skuis la mondon politikan, tio estas la rekta engaĝiĝo de MB en la helpo al eklezioj.

Antaŭ du monatoj nia prezidento vokis ĉiujn pastorojn en la ĉefurbon por trejni ilin pri la ŝtata afero. Novaj taskoj estis konfidentaj al tiuj pastoroj: ili nun iĝas la okuloj kaj oreloj de la ŝtato, ili okupiĝu ankaŭ pri ekonomia agado en la loko, kie ili deĵoras, por plenumi la devizon de la prezidento: „rapida kaj daŭra progreso”. Fakuloj instruis al ili

serĉi eblojn pri mikrokredito por starigi etajn entreprenojn. Ili devas ankaŭ helpi la registaron batali kontraŭ la koruptado. Naŭcent milionojn da malagasaj frankoj provizis al la registaro MB por



*Lignaj funebraj skulptaĵoj*



realigi la dutagan kunvenon en Antananarivo. Tio estas nur unu ekzemplo el pluraj pri tio, kiel la ŝtato enmiksiĝas en la religiajn aferojn kaj inverse.

Ŝtatlaikeco, t.e. ke la ŝtato sin retenu de religiaj aferoj kaj inverse, iĝas batalĉeftemo en la senĉesa polemiko fare de la opozicio al la nuna gvidantaro. Ili kritikadas la malrespekton de la konstitucio flanke de la prezidento, kiu principe ne plu rajtas okupiĝi pri iu alia afero krom estri la nacion, – aludo al lia vicesteco ene de la protestanta eklezio FJKM. Menciindas, ke kristanaj eklezioj disetendiĝas sur la malagasa teritorio, ĝis la plej profunda nealirebla regiono. Sur ili apogis sin la prezidento dum la lasta baloto en 2001. Probable jen estas lia maniero danki la subtenintojn. Sed aliaj observantoj opinias, ke helpo al kristanaj eklezioj signifas ankaŭ starigado de ŝildo kontraŭ la kresko de la islama influo precipe dum la antaŭa reĝimo. Tamen ne ĉiuj kristanaj eklezioj profitas el la prezidenta malavareco, nur tiuj, kiuj membras en FFKM, la unuiĝo de protestanta, romkatolika, luterana kaj anglikana eklezioj, kiu delonge provas marĝenigi aliajn „sektajn”.

El historia vidpunkto, la malagasaj religiuloj ja kutimas esprimi politikan pozicion, sed la nuna „kunlaboro” de la registaro kun eklezioj ne plu havas limon. La naciestro memdecide donacis plurajn milionojn al iuj lokaj paroĥoj, li konstruis preĝejon, la kardinalo deklaris, ke li subtenas la nunan registaron, ĉar ĝi alportas palpeblan progreson al la popolo ... El 17 milionoj da malagasoj nur pli-malpli 4 milionoj apartenas al la kristana komunumo, islamo duarangas kaj la plimulto al kroĉiĝas al la tradicia religio.

FIDILALAO Henriel



AŬSTRIO

# Ekspertoj pri la klimatsanĝiĝo

Por la sekvaj jardekoj la prognozoj antaŭvidas sekecon en la sudo kaj inundojn en la nordo de la tero, ĉar la altaj averaĝaj temperaturoj kaŭzos degelon de glacioj ĉe la polusoj. Aŭstrio, kiu estas inter ambaŭ ekstremoj kaj kuŝas en meza Eŭropo, devas prepari sin por akcepti kreskantan nombron da klimatuĝantoj el Afriko en la sekvaj dudek jaroj. „Ĉefe el la sudo de nia planedo plialtiĝos la enmigra premo al la vetere favoraj regionoj en la mondo”, diris Jacqueline McGlade [ĵaklin makglejd], administra direktorino de la Eŭropa Media Agentejo, dum podia diskutado de ekspertoj en Vieno.

McGlade, kiu antaŭ nelonge revenis de vojaĝo al Arkto, estis maltrankviligita: „En la jaro 2025 glacio sur Barenca Maro estos malaperinta. Krom la novaj ŝipitineraj kaj fiŝteritoriaj – la pozitivaj sekvoj – tio kaŭzos tamen ankaŭ tro altan nivelon de la Norda Maro.”

## Pli da karbona dioksido en Azio

„La klimatsanĝiĝo estos tiurilate la plej granda defio”, klarigis Sue Tierney [su tani], direktorino de la Vaŝingtona Analiza Grupo pri Tutmondaj Studoj. Laŭ ŝi, la tro rapida ekonomia evoluo ĉefe de Ĉinio kaj Barato estigos forte pliiĝantajn, klimatsanĝajn ellasojn de karbona dioksido en la aeron: „Ĝis 2030 ĝi duobliĝos en Azio pro la kreskanta trafiko en tiu mondparto”, diris Tierney.

La ministroj pri energio de Ĉinio kaj Barato „estas en grandaj zorgoj, kiel ili povus solvi tiujn problemojn”, raportis Hans Haider, la ĉefdirektoro de la Unuiĝo de Elektrosocietoj en Aŭstrio, pri la Monda Konferenco de Energio en 2004.



Laŭ Tierney, la mondo postulas, ke la evoluon en Azio oni faru „laŭeble energiefika”. Tamen, laŭ ŝi, ankaŭ Usonon minacas 50-procenta pliiĝo de la eligo de karbona dioksido ĝis 2055, se ĝi plu uzos petrolon kaj karbon kiel energi-bazon.

## Gvidrolo de Eŭropo

Tamen ja estas ankaŭ „signoj de espero”: unu triono de la usonaj ŝtatoj decidis akcepti klimatprotektajn programojn, akciuoj de firmaoj faris libervolajn interkonsentojn tiurilate. Per tio oni transprenis altan respondecon. „Eŭropo plu havas gvidrolon en la medipolitikaj aferoj mondscale”, aldonis McGlade.

## Klimatprotekto duagrada

Konsidere al la labormerkata krizo tutmonde „oni tamen plu subtenu la konfidon je la bezono de klimatpolitiko”, emfazis McGlade.

Laŭ la statistikulo Bjørn Lomborg kontraŭe, tiu neceso entute ne ekzistas. Laŭ li, la protekto de klimato laŭ la Kioto-protokolo (1997) estas multekosta recepto por plibonigo de la mondo kun neklaraj ŝancoj je sukceso.

En la tiel nomata Kopenhago-interkonsento (2004) estis akceptita prioritatlisto de efikaj tutmondaj reformoj. Kiel unu el la plej grandaj problemoj



*Jacqueline McGlade: Eŭropo plu havas gvidrolon en la medipolitikaj aferoj mondscale.*

de malriĉaj landoj montriĝis la poluado de aero. Batalante kontraŭ tiu granda danĝero por la homa sano, oni devus disponigi al la plej malriĉaj homoj rimedojn, por ke ili aĉetu kerosenon por hejtado kaj kuirado.

Evgeni GEORGIEV



# Originala DVD-filmo tre spektinda



**P**aŭl Gubbins, kiu direktis ĉi tiun filmon, diras ke, verŝajne, ĝi estas la unua originala dramo publikigita en Esperanto, en 1905; tamen ne eblas certeco pri tio. Diversaj dokumentoj el la frua periodo de Esperanto listigas aron da dramistoj kaj da drametoj, pri kiuj nuntempe oni ne plu povas akiri detalojn. Do, li diras, ne pro historia valoro oni spektu la drameton

nun, sed pro ĝiaj ĉarmo kaj teatra/filma karaktero.

Temas pri monologo, sed neniel senmoveca monologo. Kun nula buĝeto! La aktoro estas Colin Simmonds, pri kiu mi scias nur, ke li estas elstare profesikvalita aktoro. La filmado estas eksperte farita de Jill Gubbins. Oni filmis en la ĝardenoj de *Wedgwood Memorial College*, Barlastono, Anglio. Pli belan scenejon oni malfacile trovas. Kaj, kvankam en komentoj pri la filmado estas menciite, ke dum iom da tempo dum la filmado minacis pluvi, kaj sonis la pasado de trajnoj, tiujn sonojn la spektanto ne ĝenate aŭdas, kaj la ne-ĉiam-sunbrila vetero strange kongruas kun la enhavo.

La filmo estas komedieto kun intrigo iom bizara, sed ne komplika. Viro enamiĝas al vidvino, sed ŝi postulas, ke li aspektu kiel ŝia iama edzo, antaŭ ol ŝi konsentos edzigi lin. Plejparte tio estis facile farita. Sed la mortinta edzo konstante portis monoklon antaŭ la okulo, kaj nia heroo devas penegi kaj provadi multfoje por sukcesi pri ĉeokuligo de la monoklo. Fine li sukcesas, kaj sekve li kaj la amata vidvino amoplene ĉirkaŭbrakas unu la alian.

La vorto „duonokulvitro” estas stranga. Unue mi supozis, ke temas

pri duono de monoklo, sed, prave-ne-prave, la skipo de la filmo interpretis ĝin kiel tutan monoklon.

Laŭ la filmmenuo, ekzistas eblo vidi ankaŭ esperantlingvajn subtitolojn, verŝajne por la okazo, se eventuale spektanto ne rekonus la prononciĝon de vorto(j). Sed kiam per la DVD-ludilo en mia komputilo mi klakis sur „subtitoloj”, nenio okazis<sup>1</sup>. Nu, ne vere gravas; la prononcado de la aktoro estas glata, klara, nemiskomprenbla, tamen samtempe flua. Kaj se oni volas kontroli la detalojn, aŭ la ĝustecon, de la parolita dialogo, oni povas legi ĝin en la komputilo. Tiel eblas trovi ankaŭ kelkajn ekzercojn, por la okazo, se oni volas uzi ĝin en klasĉambro.

Ensume, mi multe ĝuis spekti ĉi filmon kaj rekomendas ĝin al ĉiu, kiu volas plezurplene ĝui farseton.

Donald BROADRIBB

Aŭgusto Baissac: *La duonokulvitro*. Eldonis Esperanto-Asocio de Britio, Barlaston, 2005. Viddisko (DVD) 14-minuta.

**Prezo ĉe FEL: 12,00 eŭroj + afranko.**

1. Almenaŭ per eŭropaj viddiskaparatoj la subtitoloj estas normale videblaj (pp).

## ALBANIO

# Ibrahim Kodra, la lasta kubisto

**E**n februaro forpasis la granda albana pentristo Ibrahim Kodra, kies verkaro estas jam monda riĉaĵo. Li konsideriĝas kiel la lasta kubisto. Li naskiĝis la 22an de aprilo 1918 en la vilaĝo Ishem [iŝem] apud Durrës (Albanio) kaj studis en la Teknika Usona Lernejo en Tirano, kie li elstaris pro rara pentrista talento.


En la jaro 1944 li malfermis la unuan ekspozicion en Milano, kaj ekde tiam liaj verkoj ĉeestas en grandaj muzeoj kaj renomaj galerioj de la mondo kune kun la gigantoj de pentroarto, Picasso, Matisse, Chagall, Modigliani, Dufy ... Li kunlaboris kun grandaj poetoj kiel Paul Eluard kaj la Nobel-premiitoj Quasimodo, Montale k.a.

Inter diversaj premioj akiritaj men-ciindas *La Ora Medalo* de la Franca Akademio kaj la titolo *Honora Civitano* en kelkaj italaj urboj. Aliaj honorigoj estas ankaŭ la premio *Ora Ambrogino* de la urbo Milano kaj nelaste la premio *La Honoro de la Nacio* de la prezidanto de Albanio.

BARDHYL Selimi

# Bonstille verkita streĉa romano

La libro *The Da Vinci Code* (La da-Vinĉi-kodo) daŭre vekas interesiĝon. Jam Lode Van de Velde recenzis la verkon en *MONATO* (2005/2, p. 27), Karlo Ĝelozo aldonis siajn proprajn komentojn (2005/9, p. 6), kaj jen plia recenzo, ĝuste en la momento, kiam la filmfestivalo de Cannes malfermiĝas per la prezentado de la filma versio de tiu romano de Dan Brown.



La libron *La da-Vinĉi-kodo* mi legis en nederlanda traduko, sed ĝi estas tiel flua, ke laŭ mi tio ne influas mian juĝon pri la verko.

Unue: la verko estas bonstille verkita, kiel sufiĉe streĉa romano, kvankam min persone ĝenas la fakto, ke ne unufoje sed plurfoje la aŭtoro kredas plistreĉigi sian rakonton per ĉesigo de la agado ĝuste post sciigo, ke jen ili vidis / aŭdis ion decidige gravan, kaj jen sekvas unu aŭ du ĉapitroj pri alia figuro de la romano, por nur post tiu interrompo daŭrigi ĉe la anoncita granda malkovro, kiu kutime estas ekzemple kelkversa poemeto aŭ io simila. Do, laŭ mi, Brown tro forte emas substreki, ke tio, kion li verkas, vere estas streĉa romano. Por homoj, kiuj malofte ion legas, tio supozeble estas bela rimedo.

La rakonto mem vekis mondvas-tan intereson ĉefe pro tio, ke iel la aŭtoro provas kredigi nin – publikon – pri mondvas-te ekzistanta konspiro kun Vatikano, *Opus Dei* kaj tria partio, Priorejo de Ciono, kiel protagonistoj. En la romano mem kelkaj roluloj asertas, ke la ĝenerala publiko ŝatas tiajn konspirorakontojn; nu, s-ro Brown ĝin liveras.

Laŭdire, Vatikano kaj *Opus Dei* malsamkiale klopodas por havigi al si la potencon super la Sankta Gralo, kiun tra la jarcentoj prigradas la Priorejo de Ciono. Male ol kutime, ĉi tie la Gralo ne estas materia objekto (kutime kiel tian oni indikas la pokalon, el kiu Jesuo trinkis dum la lasta manĝo kun siaj gelernantoj), sed ĉe Dan Brown, tre originale, la Gralo estas indiko por ĉio, ligita al la historio de Maria Magdalena: dokumentoj pri ŝi mem, pri ŝia asertata nupto kun Jesuo, pri ilia idaro, kiu certatempe estus identa je la dinastio de la merovidoj (dinastio en malnova Francio, kiun forpuŝis la dinastio de Karolo la Granda) kaj pri ties posteuloj tra la jarcentoj ĝis en la nuno.

Certe estas bela invento tiamaniere kombini plurajn fade-nojn de mistereco: la rakontojn pri la ekesto de la frua kristanismo, pri la Gralo, pri – ĝeneralpublike

– iom misteraj praaj reĝaj dinastioj, pri mezepoka kaj renesanca reprezalioj ekleziaj kontraŭ ĉio, kio nur povus aspekti hereze, pri rozkruĉismo, frama-sonismo ktp.

S-ro Brown verkas kutime bone dokumentite. Ja ekzistas tre fruaj tradicioj pri am-ligiteco sufiĉe ekskluziva inter Maria Magdalena kaj Jesuo (en Esperanto ekzemple vidu mian *La Evangelio laŭ Maria Magdalena*), kaj tre povas esti, ke ili sin amis; ankaŭ la fama romano de la greka aŭtoro Nikos Kazantzakis – *La lasta tento de Kristo* tion traktis jam delonge. Kaj estas kompreneble, ke funkciuloj de Vatikano, verŝajne, ne volonte preparolus tiajn asertojn. Sed aliflanke: tion oni facile povas nomi legendoj, do sendanĝerigi. Vidi ian bezonon, ke Vatikano kiel ajn volus neniigi tiajn – ja eldonitajn! – teks- ▶



David Galadí-Enríquez  
kaj Amri Wandel

# La kosmo kaj ni

Galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo  
(dua plivastigita eldono).

Vera manlibro pri teoria kaj praktika astronomio,  
verkita de du profesiaj astronomoj.

224 paĝoj; ilustrita; bindita; 2005

Prezo ĉe FEL: 18 eŭroj + afranko  
Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

būtiko@fel.esperanto.be  
www.retbutiko.net

aŭ ĉe via preferata libroservo

Premio Pirlot  
2001

► tojn, estas minimume troigo. Sed en la romano – interesa tezo.

Krome ankaŭ per dokumentoj pri Leonardo da Vinci, pri liaj pentraĵoj kaj manuskriptoj, la aŭtoro sufiĉe bone provizis sin. Same pri diversaj preĝejoj, katedraloj, muzeoj ktp. Por homoj, kiuj nur tre malmulte vidis proprokule de niaj kulturaj heredaĵoj tutmondaj, jen bela invito iom viziti tiujn, ĉu interrete, ĉu persone. Ŝajnas, ke plurajn katedralojn kaj muzeojn vizitas nun pli da homoj, ol kutime, interalie kiel reago al legado de tiu ĉi romano. Se tio estas vera, estus bela sekvo.

Kelkaj aferoj, bedaŭrinde, estas vere malverŝajnaj: ekzemple, se en preĝejo protestanta iu bezonas tekston biblian, estas sufiĉe normale iri al la pupitro aŭ la katedro por tie konsulti la Bibliion. Tiu ja troviĝas en ĉiu normala protestanta preĝejo. Sed iri al la altaro en romkatolika preĝejo por tie konsulti la Bibliion estas sufiĉe nerealece: tie kutime troviĝas nur meslibro, kiu ja enhavas ie tie citaĵojn el la Biblio, sed nepre ne estas facile tie serĉi – kaj tuj trovi – difinitan versiklon el Ijob. Da tiaj detaloj renkontiĝas kelkaj. Sed la plimulto de la publiko tion supozeble eĉ ne rimarkas.

La fino de la romano estas absolute tro artefarita kaj malplifortigas la tuton: renkontiĝo kun homoj, kiujn oni opiniis mortintaj, kaj kiuj pruviĝas esti vivintaj dum jardekoj alilande – nu, tio estus bela tezo en la tipo de romano kiel *Kastelo de Prelongo* kaj simile. Mi bedaŭras, ke Brown ne fortranĉis tiun pecon.

Entute: verko, kiu meritis disvendiĝi sufiĉe bone, sed ke tio okazis je tia mirinda amplekso, laŭ mi, ne estas bone kompreneble: historie li rakontas nenion novan, streĉaj romanoj aperas en la mondo po miloj, la stilo estas flua, sed tute simpla, neniel speciala. Do ĝian furoran sukceson mi tute ne komprenas.

Mi scivolas, ĉu post kelkdek jaroj ĝi ankoraŭ trovos legantojn. Verŝajne ne multe. Por tio ĝi miatakse ne havas sufiĉe da individueco. Da tiaj „streĉaj romanoj” ja ekzistas tiom.

Gerrit BERVELING



## ANONCETOJ

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de).

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Iház, F. u. 41/5. Rete: [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com).

**Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko?** Esperanto-sudoko estas sudoko-enigmo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigmo-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net).

**Esperanto-instruistoj:** vizitu [www.edukado.net](http://www.edukado.net). Ĉio de vi por vi!

**Facilaj donacoj** por viaj korespondamiko: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas librokuponoj en kiu ajn sumo, kiun oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL ([www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net)), kaj donacokuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro\* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj\*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al [http://www.esperanto.be/fel/mon\\_mon\\_anon.php](http://www.esperanto.be/fel/mon_mon_anon.php).

\*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

IEK 2006

Internacia Esperanto-Konferenco



OSIEK  
<http://osiek.org>

en TIMISOARA, Rumanio, 15a-21a de julio

# Kio estas Oriento ?

postkonferencaj ekskursoj en la regiono

informoj, aliĝoj :

Eric LAUBACHER  
1, rue Bougainville  
78180 MONTIGNY-8x, Francio  
tel. +33 1 30 96 67 91  
kasisto@osiek.org

Maria BUTAN  
Aleea F.C. Ripensia n° 34 ap.3  
300585 TIMIȘOARA, Rumanio  
tel. +40 256. 464193  
fakso +40 256. 200296

LA ONDO  
DE ESPERANTO

## La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

Abonebla kontraŭ  
27 EUR ,  
30 USD aŭ egalvaloro  
ĉe UEA, FEL, ELNA,  
UFE, EAB, SEF kaj  
dudeko da aliaj landaj  
perantoj.

- \* Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- \* Tra Esperantujo
- \* Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikajoj
- \* Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- \* Historio kaj kulturo de Esperanto
- \* Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- \* Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- \* Literatura suplemento jarfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

# Komencanto

[komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)

## "Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998 – Formato A4, 16 paĝoj

Abontarifo: **15 eŭroj**  
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.


Abonu ĉe UEA aŭ via landa peranto

retpoŝto: [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)  
provizora retpaĝo: [www.Komencanto.narod.ru](http://www.Komencanto.narod.ru)

Poŝta adreso: KOMENCANTO, pk 132, Ekaterinburg, 620041, Rusio.

# www.retbutiko.net

## Vagu laŭplaĉe inter la verkoj de la Retbutiko.



**Kategorio**  
elektu la  
specon kiun  
vi deziras



**Kvanto**  
skribu tie ĉi la  
kvanton, se vi  
deziras mendi

**Bildo**  
kun fotoj de la plej  
gravaj verkoj

**Detaloj**  
pliaj detaloj  
kiel eldonjaro,  
paĝnombro,  
priskribo, ktp.

**Recenzo**  
legu recenzojn  
pri la verko

**www.retbutiko.net**

**1996-2006**  
**La retbutiko**  
**10 jara!**